

## Ĉapitro kvara

*Kiu permesis al si tiun diablan ŝercon? Kaptu lin kaj forŝiru de lia vizaĝo la maskon por ke ni sciu, kiun ni devas pendumi matene sur la muro de la fortikaĵo!*

*E. Poe*

Mi aĉetis “Pravda”-n<sup>1</sup> de antaŭhieraŭ, eltrinkis gasakvon kaj instaligis surbenke en ĝardeneto, enombre de la Honortabulo. Estis la dekunua. Mi atente trarigardis la ĵurnalon. Tio forprenis sep minutojn. Poste mi tralegis artikolon pri hidroponiko, felietonon pri koruptemuloj el Kansk kaj grandan leteron de laboristoj de ĥemia uzino en la redakcion. Ĉio ĉi forprenis entute nur dudek du minutojn. “Eble mi vizitu kinejon” — mi pensis. Sed “Kozara”-n mi jam spektis — unu fojon en kinejo kaj unu fojon per televido. Do mi decidis trinki akvon, faldis la ĵurnalon kaj leviĝis. El la tuta avinaĉa kupraro en mia poŝo restis nur unusola kvinkopeka monero. Mi ĝin fortrinku, mi decidis. Mi fortrinkis akvon kun siropo, ricevis unukopekan repagon kaj aĉetis en la najbara butiko skatolon da alumetoj. Nun en la centro de la urbo mi havis por fari absolute nenion. Kaj mi iris okulrigarden — en nelarĝan straton inter la butiko № 2 kaj la manĝejo № 11.

Preterpasantoj en la strato preskaŭ mankis. Min antaŭiris granda polvokovrita ŝarĝaŭto kun tondreganta trenĉaro. Ties ŝoforo, elŝovinte straten la kapon kaj la kubuton, lace rigardis pavimŝtonegojn. La strato descendanta havis abruptan turnon dekstren, ĉe la turnopunkto apud la trotuaro elstaris el la grundo paftubo de antikva krudfera kanono, kiesl aperturo estis plenŝtopita per tero kaj cigaredstumpoj. Baldaŭ la strato finiĝis per deklivo al rivero. Iom da tempo mi sidis surrande de la deklivo kaj ĝuis la pejzaĝon, poste transiris en la alian flankon de la strato kaj ekpaŝis reen.

“Interese, kien malaperis tiu ŝarĝaŭto?” — mi ekpensis subite. Mankis ia descendovojo de sur la deklivo. Mi ĉirkaŭrigardis, serĉante pordegon ambaŭflanke

---

<sup>1</sup> “Pravda” (“Vero”) — ĉiutaga ĵurnalo de la Komunista Partio.

de la strato, kaj ĉi-momente trovis negrandan, sed tre strangan domon, enpremitan inter du mornaj brikaĵoj “labazoj”. La fenestroj de ĝia suba etaĝo estis ŝirmitaj per feraj vergoj kaj duone blankigitaj per kredo. Sed pordoj en la domo entute forestis. Mi tion tuj rimarkis, ĉar la ŝildo, kiun oni kutime lokigas apud pordego aŭ apud enirejo, pendis ĉi tie ĝuste inter du fenestroj. Sur la ŝildo estis skribite: “AS USSR IESMASO”. Mi retiriĝis en la mezon de la strato: jes, du etaĝoj po dek fenestroj kaj eĉ ne unu pordo. Sed dekstre kaj maldekstre ĝin premas “labazoj”. “IESMASO. — mi pensis. — Instituto Esplor-Scienca... Maso? Kies maso? Mult-Armita Sekureca Organizo? Morna Asocio de Suda Oceanio? La kokokrura kabano, — mi pensis, — estas muzeo de tiu ĉi IESMASO. Miaj samvoĵanoj verŝajne estas ankaŭ de tie ĉi. Ankaŭ tiuj en la teumejo...” De sur la tegmento de la konstruaĵo leviĝis kornikaro kaj grakante ekcirkulis super la strato. Mi turnis min kaj ekiris reen, al la placo.

Ĉiuj ni estas naivaj materialistoj. Ankaŭ racionalistoj ĉiuj ni estas. Ni volas, ke ĉio estu senprokraste klarigata racionalisme, do bazita sur manpleno da konataj faktoj. Sed neniuj el ni posedas eĉ guton da dialektiko. Neniuj akceptas en la kapon, ke inter la faktoj konataj kaj iu nova fenomeno povas etendiĝi maro da nekonataĵoj, kaj tiuokaze ni proklamas la novan fenomenon supernatura kaj, sekve, malebla. Jen ekzemple, kiel akceptus *le maitre Montescqieu* la informon pri revivigo de mortinto kvardek kvin minutojn post registrita korohalto? Perbajonete li akceptus, plej verŝajne. Li proklamus, ke ĝi estas obskurantismo kaj popismo. Se entute li ne estus tuj forŝingita similan informon. Sed se tio estus okazinta antaŭ liaj okuloj, li trafus la situacion, ekstreme embarasan. Samkiel mi nun, tamen mi estas pli kutimiĝinta. Sed li devintus opinii tiun resurekton trompo, aŭ apostati pri la propra percepto, aŭ eĉ rezigni materialismon. Plej verŝajne, li opinius tiun resurekton trompo. Sed ĝis la vivofino la rememoro pri tiu lerta artifiko restus incitanta lian pensadon, simile al spliteto en okulo... Sed ja ni estas naskiĝintaj en alia jarcento. Ni jam multon vidis: vivantan kapon de hundo, kudritan al la korpo de aliu viva hundo, kaj artefaritan renon, ŝranke grandan, kaj malvivan feran manon, direktatan de vivaj nervoj, kaj la personojn kiuj povas diri svage: “Ĝi okazis jam post kiam mi estis forpasinta la unuan fojon...” Jes, en la nuna tempo *Montescqieu* havus nemultajn ŝancojn resti

materialisto. Sed ni ja restas, kaj nenio terura okazas! Efektive, fojfoje ni havas problemojn — se hazarda vento subite alportas al ni trans la oceanon de nekonataĵoj iajn strangajn petalojn de sur senfinaj kontinentoj de nesciata. Kaj plej ofte ĝi okazas, kiam vi trovas ne tion, kion serĉas. Jen do baldaŭ en zoologiaj muzeoj estas aperontaj mirindaj animaloj, la unuaj animaloj de sur Marso aŭ Venuso. Jes, kompreneble, ni gapos al tiuj kaj frapos niajn femurojn, sed ni ja delonge jam atendas tiujn animalojn, ni estas perfekte preparitaj por ilia apero. Ni estus multe pli konsternitaj kaj disreviĝintaj, se tiuj animaloj ne ekzistus tute, aŭ se ili evidentiĝus similaj al niaj katoj kaj hundoj. Kutime la scienco, kiun ni kredas (plej ofte — blinde), frue kaj delonge antaŭpreparas nin por la okazontaj mirakloj, kaj psika ŝoko trafas nin nur tiam, kiam ni alfrontas ion neaŭguritan — ian truon en la kvaran dimension, aŭ biologian radiokonekton, aŭ vivan planedon... Aŭ, ekzemple, la kokokruran kabanon... Tamen ja pravus la kurbonaza Roman: tiu ĉi loko estas tre interesa...

Mi eliris en la placon kaj haltis antaŭ la gasakvo-kiosko. Mi bone memoris, ke ne havas monerojn, kaj mi sciis, ke mi devos pagi per papermono, kaj mi jam estis pretiginta humilan rideton, ĉar vendistinoj de gasakvo ne toleras ŝanĝon de papermono, sed subite mi trovis en la ĵinsopoŝo kvinkopekan moneron. Mi ekmiris kaj ekĝojis, sed mi ekĝojis pli ol ekmiris. Mi trinkis gasakvon kun siropo, ricevis malsekan kopekon kiel repagon kaj babiletis kun la vendistino pri vetero. Poste mi senhezite direktis min hejmen, por pli rapide finfari ĈP-on kaj TP-on kaj ekokupi min pri raci-dialektikaj klarigoj. La kopekon mi ŝovis en la poŝon kaj haltis, trovinte, ke en la sama poŝo ĉeestas plia kvinkopeka monero. Mi eligis kaj priesploris ĝin. La monero estis iom humida, sed ĝin ornamis la surskribo “5 kopekoj 1961”, kaj la cifero “6” estis iom difektita pro neprofunda kaveto. Eble mi eĉ tiam ne atentus la okazeton, se ne aperu jam konata momenta eksento, kvazaŭ mi estas samtempe staranta en la avenuo de Paco kaj sidas sur la divano, stulte spektanta la hokaron. Kaj samkiel antaŭe, kiam mi skuis la kapon, la eksento malaperis.

Ioman tempon mi estis plu iranta malrapide, distrite ĵetante kaj kaptante la moneron (ĝi falis en la manplaton ĉiufoje per averso), kaj provis koncentriĝi. Poste mi ekvidis la vendejon, kie matene mi savis min de la knabaro, kaj eniris tien.

Tenante la kvinkopekan moneron per du fingroj, mi min direktis tuj al vendotablo, kie estis sukaj kaj akvo, kaj absolute sen plezuro eltrinkis glason da akvo sen siropo. Poste, preminte la repagaĵon enpugne, mi foriris flanken kaj kontrolis la poŝon.

Tio estis ĝuste la okazo, kiam oni evitas la psikan ŝokon. Versimile, mi estus pli mirigita, se mi ne trovus la kvinkopekan moneron en la poŝo. Sed ĝi estis tie — la humida monero de 1961 kun la kaveto sur la cifero “6”. Iu puŝetis min kaj demandis, ĉu mi dormas. Evidentiĝis, ke mi staris envice al la kasejo. Mi diris, ke mi ne dormas, kaj pripagis kvitancon por tri alumetskatoloj. Enviciĝinte por ricevi la alumetojn, mi trovis, ke la monero estas en la poŝo. Mi estis tute trankvila. Ricevinte tri skatolojn, mi eliris el la vendejo, revenis en la placon kaj komencis eksperimentadi.

La eksperimentado prenis ĉirkaŭ unu horon. Dum tiu horo mi dekfoje ĉirkaŭiris la placon, ŝveliĝis pro akvo, alumetskatoloj kaj ĵurnaloj, konatiĝis kun ĉiuj vendistoj kaj vendistinoj kaj venis al vico de interesaj konkludoj. La monero revenas al mi, se mi pagas per ĝi. Se mi simple ĝin forĵetas, lasas, perdas, ĝi restas tie, kie ĝi estas falinta. La monero revenas en la poŝon en la momento kiam la repago transiras el la mano de vendisto en la manon de aĉetinto. Se mi dum tiu momento tenas la manon en unu poŝo, la monero aperas en la alia. En la poŝo zipumita ĝi aperas neniam. Se mi estas enpoŝiginta ambaŭ manojn kaj prenas la repagon perkubute, la monero povas aperi ie ajn ĉe la korpo (en mia okazo mi trovis ĝin en la ŝuo). Mi ne sukcesis fiksi malaperon de la monero el la telereto kun kupra mono: inter cetera kupro la monero tuj perdiĝas, kaj nenia movo en la telereto okazas en la momento, kiam la monero transiras en la poŝon.

Do certe mi alfrontis la tiel nomatan neŝanĝeblan kvinkopekon; mi testis la procezon de ties funkciado. Per si mem la fakto de neŝanĝebleco ne tre interesis min. Mia imago estis konsternita antaŭ ĉio pro la ebleco de eksterspaca transportado de materia aĵo. Estis por mi tute klara, ke mistera transiro de la kvinkopeko de vendisto al aĉetanto ne estas io alia, sed speciala okazo de tiu fama nul-transportado, bone konata al la ŝatantoj de sciencfikcia literaturo ankaŭ sub la

pseŭdonomoj: hipertransiro, repagulara salto, fenomeno de Tarantoga<sup>2</sup>... La malfermataj perspektivoj estis brilaj.

Mi havis neniajn mezurilojn. Ordinara laboratoria termometro povus doni multon, sed eĉ tiun mi ne havis. Mi devis limigi min nur pri subjektiva perokula observado. Mian lastan rondiron ĉirkaŭ la placo mi komencis, doninte al mi la sekvantan taskon: “Metante la kvinkopekon apud pormonera telereto kaj laŭeble malhelpante vendiston miksi ĝin kun aliaj moneroj antaŭ repago, sekvi perokule la procezon de transportado de la kvinkopeko en la spaco, samtempe strebante almenaŭ kvalite determini ŝanĝon de aertemperaturo ĉirkaŭ la supozata transporta trajektorio”. Tamen la eksperimento estis rompita tuj en la komenco.

Kiam mi proksimiĝis al la vendistino Manjo, min jam atendis la sama junaĝa milicisto serĝentranga.

— Do, — li diris profesivoĉe.

Mi humile rigardis lin, antaŭsentante malbonon.

— Bonvolu montri dokumenton, civitano, — diris la milicisto, levante la manon al viziero kaj rigardante preter mi.

— Sed kiakaŭze? — mi demandis, elpoŝigante la pasporton.

— Ankaŭ la kvinkopekon mi petas, — diris la milicisto, prenante la pasporton.

Mi silente fordonis al li la kvinkopekon. Manjo rigardis min per koleraĵ okuloj. La milicisto pririgardis la moneron kaj, elparolinte kun kontento: “Aha...”, malfermis la pasporton. Ĝin li esploradis, samkiel bibliofilo esploras raran inkunablon. Mi turmente atendis. Ĉirkaŭ ni malrapide kreskis homamaso. En la amaso estis dirataj diversaj opinioj rilate min.

— Mi bedaŭras, sed vi devas sekvi min, — diris fine la milicisto.

Mi sekvis. Dum ni iris, en la akompananta amaso estis kreitaj kelkaj variantoj de mia nefacila biografio kaj formulita vico de kaŭzoj, provokintaj la esploradon, kiu komenciĝis antaŭ ĉies okuloj.

---

<sup>2</sup> Tarantoga — fikcia profesoro el romanaro de Stanislav Lem.

En la milicejo serĝento transdonis la kvinkopekon kaj la pasporton al deĵoranta leŭtenanto. Tiu pririgardis la kvinkopekon kaj proponis ke mi sidiĝu. Mi sidiĝis. La leŭtenanto eldiris indifere: “Fordonu la monerojn”, — kaj same mergiĝis en studadon de la pasporto. Mi elŝutis kuprajn monerojn el la poŝo. “Rekalkulu, Kovaljov”, — diris la leŭtenanto kaj, formetinte la pasporton, komencis rigardi en miajn okulojn.

— Ĉu multon vi sukcesis aĉeti? — li demandis.

— Multon, — mi respondis.

— Ankaŭ tion fordonu, — diris la leŭtenanto.

Mi metis sur la tablon antaŭ li kvar ekzemplerojn de la antaŭhieraŭa “Pravda”, tri ekzemplerojn de loka ĵurnalo “Fiŝkaptisto”, du numerojn de la “Literatura gazeto”, ok alumetskatolojn, ses bombonojn “La Ora Ŝlosilo” kaj etprezan broseton por purigo de primusoj.

— La akvon mi ne povas fordoni, — mi diris sektone. — Kvin glasojn kun siropo kaj kvar sen siropo.

Mi komencis kompreni, pri kio temas, kaj mi sentis min ekstreme ĝene kaj malkomforte ĉe la penso, ke mi devos nun pravigi min.

— Sepdek kvar kopekoj, kamarado leŭtenanto, — raportis la juna Kovaljov.

La leŭtenanto enpensiĝinte observadis la amaseton da ĵurnaloj kaj alumetskatoloj.

— Ĉu vi por distro tion faris, aŭ?.. — li demandis min.

— Aŭ, — mi diris morne.

— Nesingarde, — diris la leŭtenanto. — Nesingarde, civitano. Bonvolu rakonti.

Mi rakontis. En fino de la rakonto mi insiste petis la leŭtenanton ne trakti miajn agojn, kiel provon akumuli monon por “Zaporoĵec”. Miaj oreloj ruĝbrulis. La leŭtenanto ekridetis.

— Kial do mi ne traktu? — li demandis. — Estis la okazoj, kiam oni estis akumulintaj.

Mi levis la ŝultrojn.

— KREDU min, tiu penso ne povus veni en mian kapon... Tamen, kion mi diras — ne povus, ĝi efektive ne venis!..

La leŭtenanto longe silentis. La juna Kovaljov prenis mian pasporton kaj refoje ekstudis ĝin.

— La supozo estus eĉ iom stranga... — mi diris embarasite. — La intenco estus plena deliraĵo... Ŝpari po kopeko... — Mi denove levis la ŝultrojn. — Tiuokaze pli efika estus almozpetado ĉepreĝeja...

— Ni luktas kontraŭ almozpetado, — altsignife diris la leŭtenanto.

— Nu ĝuste, nature... Mi ne komprenas nur, kian rilaton mi havas al tio, kaj... — Mi kaptis min ĉe tio, ke mi tre ofte levas la ŝultrojn, kaj mi ĵuris al mi ne plu fari tion.

La leŭtenanto denove silentis turmentige longtempe, pririgardante la kvinkopekon.

— Tamen ni devas kompili protokolon, — li diris finfine.

Mi levis la ŝultrojn.

— Bonvolu, certe... kvankam... — Mi ne sciis tamen, kion “kvankam”.

Ioman tempon la leŭtenanto rigardis min, atendante daŭrigon. Sed mi estis ĝuste tiam pripensanta, kiu artikolo de la kriminala kodo kvalifikas miajn agojn, do li movis al si paperfolion kaj komencis skribi.

La juna Kovaljov revenis al sia posteno. La leŭtenanto skrapis per plumo kaj ofte kun frapo trempis ĝin en inkujon. Mi sidis, senpense rigardante la afiŝojn, pendigitajn sur la muroj, kaj feble meditadis pri tio, ke Lomonosov, ekzemple, en mia nuna situacio estus tuj kaptinta la pasporton kaj elsaltus fenestren. “En kio, propre, estas la esenco? — mi pensis. — La esenco estas en tio, ke persono mem ne opiniu sin kulpa. En tiu senco mi ne kulpas. Sed kulpeco ŝajne ekzistas objektiva kaj subjektiva. Kaj la fakto restas fakto: la tuta kupra mono en la kvanto de sepdek kvar kopekoj dejure estas rezulto de ŝtelo, efektivigita kun uzo de teknika rimedo, kiu estas ĝuste la neŝanĝebla kvinkopeko”.

— Bonvolu tralegi kaj subskribi, — diris la leŭtenanto.

Mi tralegis. Laŭ la protokolo evidentis, ke mi, la subskribinto Privalov A.I., per la metodo por mi ne konata ekposedis funkciantan ekzempleron de neŝanĝebla

kvinkopeko, modelo GOST 718-62<sup>3</sup> kaj trouzis ĝin; ke mi, la subskribinto Privalov A.I., asertas, kvazaŭ ĉiujn ĉi agojn mi faris celante nur sciencan eksperimenton, sen iaj ajn profitaj intencoj; ke mi pretas kovri la malprofiton, kaŭzitan por la ŝtato en sumo de unu rublo kaj kvindek kvin kopekoj; ke mi, finfine, konforme al la decido de Solovec-a urba konsilantaro de la 22-a de marto 1959, transdonis la menciitan modelon de neŝanĝebla kvinkopeko al deĵoranta milicisto, leŭtenanto Sergienko U.U. kaj ricevis anstataŭ tiu kvin kopekojn per la mono, uzata oficiale en la teritorio de Soveta Unio. Mi subskribis.

La leŭtenanto komparis mian subskribon kun tiu en mia pasporto, ankoraŭfoje akurate rekalkulis kuprajn monerojn, telefonis ien, celante ĝustigi prezon de la bombonoj kaj de la porprimusa broseto, skribis kvitancon kaj donis ĝin al mi kune kun kvin kopekoj per la mono uzata oficiale. Redonante al mi la ĵurnalojn, la alumetojn, la bombonojn kaj la broseton, li diris:

— Sed la akvon vi, laŭ via persona konfeso, fortrinkis. Do sume vi ŝuldas okdek unu kopekon.

Mi pagis kun grandega faciliĝo. La leŭtenanto ankoraŭfoje atente trafolumis mian pasporton kaj redonis ĝin al mi.

— Vi rajtas foriri, civitano Privalov, — li diris. — Kaj estu pli singardema poste. Ĉu vi restos por longe en Solovec?

— Morgaŭ mi forveturos, — mi diris.

— Jen do, ĝis morgaŭ estu pli singardema.

— Ok, mi penos, — mi diris, kaŝante la pasporton. Poste, obeante la impulson, mi demandis mallaŭtiginte la voĉon: — Sed diru al mi, kamarado leŭtenanto, ĉu por vi ĉi tie, en Solovec nenio estas stranga?

La leŭtenanto jam estis enrigardanta iajn paperojn.

— Mi delonge loĝas ĉi tie, — li diris distrite. — Mi al kutimiĝis.

---

<sup>3</sup> GOST — ŝtata normiga sistemo en USSR kaj Rusio.